ISSN 2072-5825

# Espero Katolika



Numero 1-3/2012

Januaro-Marto 2012

**JARKOLEKTO 109 - N. 1086-1088 - Januaro/Februaro 2012**
*Finpresita la 15.05.12* — Finito di stampare il 15.05.12

***Sur la kovrilo:*** *Romo, la 4an de februaro 2012: strato apud la C.O. de IKUE, vidalvide al la kupolo de la vatikana Baziliko. Abunda neĝado trafis Romon blankigante ĝin (v. p. 6). Foto: Antonella Ruggeri.*

## ENHAVO

**ENKONDUKE:** Espero Katolika ne aperas... Ĉu IKUE mortis? 2

**“Eduki la junulojn al justeco kaj paco”**
**Mesaĝo** de la Papo por la monda tago de la paco 2012 3

**Preĝosemajno por la unueco de la Kristanoj 2012**
La **oktago**: ĝia temo, pripenso de la Papo, kontribuo de esperantistoj 4

**Sinprezento de la nova IKUE-prezidanto**
Bileto de la Prezidanto, Giovanni **Daminelli** 6

**Neĝo en Romo** 6

**“Dankon pro viaj celoj, viaj pensoj, via volo”**
Oscar Luigi **Scalfaro**, respublika prezidanto, amiko de esperantistoj 7

**65a IKUE-Kongreso — 14a/21a de julio, Pécs, Hungario**
Ĉiuj informoj kaj la aliĝilo de **“Nia 65a”** 9

**Bibliaj Tagoj 2012**
En **Trento**, la urbo de la Koncilio 13
Kromaj **fotoj** de la ekumena aranĝo 20

**Balotoj IKUE 2011**
Oficiala **protokolo** pri la rezulto 16
**Biografioj** de la novaj Estraranoj 17

**Invito al IKUE-anoj** 19

**Radio Vatikana**, 19

**Centra Oficejo de IKUE: Via di Porta Fabbrica 15, I-00165 ROMA RM, Italio**

**Telefono kaj fakso: +39-06.39.63.81.29 - Elektronika poŝto:** <ikue@ikue.org>
**TTT-paĝoj:** http://www.ikue.org - http://www.esperokatolika.org * **Dissendolisto:** <ikue@yahoogroups.com>
**UEA-konto “ikue-v” * Banko:** “Unione internazionale cattolica esperantista” Roma, Italio
IBAN IT34H0760103200000023290000 - BIC/SWIFT: BPPIITRRXXX

*Registriĝo ĉe la tribunalo de Romo* - Registrazione presso il Tribunale di Roma
n. 17138, 11-2-1978

Gratis agli Associati

*Presejo* - Tipografia
ROTASTAMPA s.a.s. - Via G. Mirri 21, 00159 ROMA RM, tel. +39-06.43.80.051

*Respondeca Direktoro* - Direttore responsabile
Antonio DE SALVO, Via Aldebaran 13, Parco Azzurro, I-00012 GUIDONIA RM, Italio
tel. (vespere) +39-07.74.36.36.03 E-poŝto: <antoniodesalvo@tiscali.it>

**Espero Katolika**, revuo fondita en 1903, estas oficiala organo de **I.K.U.E.**
**INTERNACIA KATOLIKA UNUIĜO ESPERANTISTA** internacia asocio de fideluloj fondita en 1910, agnoskita laŭ pontifika juro per Dekreto n. 196/92/S-61/B-25 de 11.2.1992 de la PAPA KONSILIO POR LAIKOJ. **Spirita Konsilanto:** frato Pierluigi Svaldi - **Prezidanto:** Giovanni Daminelli **- Vic-Prezidantino:** Marija Belošević - **Vic-Prezidanto:** Miloslav Šváček - **Ĝenerala Sekretario/Kasisto, direktoro de la C.O.:** Carlo Sarandrea - **Estrarano por ekumenaj rilatoj:** Stefan Lepping. **Kontorevizoroj:** Norma Cescotti Covelli, Tiziana Fossati, Krzysztof Tomczak.




# ESPERO KATOLIKA NE APERAS... ĈU IKUE MORTIS?

Kun ioma ŝanceliĝo, sed subtenata de la forto, kiun la kredo donas al mi kaj laŭ la ekzemplo de tiuj noblaj gefratoj "kiuj antaŭeniris antaŭ ni", mi sentas la devon meti ĉi tiujn disajn pensojn ĉi tien, en la unuan numeron de EK 2012, kiu aperas monatojn post la antaŭa. Intertempe la Estraro de IKUE, la landaj Reprezentantoj, la prezidantoj de landaj asocioj kaj unuopulaj aktivuloj ricevis plej diversajn leterojn, kiujn oni esence povas resumi per matematika formulo: EK ne aperas = IKUE mortis. Multaj ne renovigis aliĝon pro tio. Mi ege bedaŭras, ke mi mem kontribuis al tia serio da reagoj. Sed permesu, ke mi, plene komprenante la kritikojn, diru ion.

**MALAPERO DE EK TRA LA JARDEKOJ**. Nia kara revuo travivis plurajn periodojn dum kiuj ĝi ne aperis. Tuj estiĝis – ĉiufoje – reagoj de abonantoj, kiuj plendegis kontraŭ la tiamaj redaktoroj: pastroj Peltier, Font y Giralt, Metzger, Ramboux – por ne citi eventojn proksimajn al ni... La historio poste instruis al ni, ke aliaj estis la problemoj de la redaktantoj: pastro Peltier mortis juna pro malsano; pastro Font y Giralt fariĝis viktimo de kontraŭkristana persekuto; pastro Metzger pereis en koncentrejo; pastro Ramboux eble agis tro malŝpareme kaj lia vivo poste estis alia, ktp. Dankemon ĉiuokaze oni levu al la Ĉielo pro ĉiuj laborantoj, konataj kaj nekonataj, rememorataj kaj forgesitaj.

**ĈU IKUE ESTAS «ESPERO KATOLIKA» KAJ PUNKTO?** Al ĉi tiu demando oni nepre devas respondi NE. La nova statuto – frukto de intensa laborado de pluraj kaj frukto de grandegaj elspezoj, kiujn neniu repagis al IKUE - donas fortan armilon al la membraro: ĉu vi volas legi gazeton? Ĉu vi volas subteni asocion? Ĉu vi volas legi gazeton kaj subteni asocion? Nun estas 3 la kategorioj de aliĝoj, kiujn ne antaŭvidis la antaŭa Statuto de IKUE. Do: oni libere kaj laŭplaĉe elektu. Nun tio eblas.

**ĈU IKUE MORTIS?** Mi povas diri tutcerte: NE. Dum EK ne aperis IKUE daŭrigis sian ekziston per pli kaj pli granda konkero de prestiĝo ekstere. Dum iuj IKUE-anoj plendis pro nericevo de kelkaj paperaj folioj, IKUE kongresis en Parizo (la nia estas la unika E-asocio kiu rekongresis en la sama urbo de sia fondiĝo: ne UEA, nek ILEI, KELI, SAT k.a. sukcesis fari tion); EK estis oficiale akreditita ĉe gravaj ekleziaj eventoj; daŭras la E-elsendoj de Radio Vatikana - parte pagataj de IKUE - kiam multaj internaciaj radioelsendoj malaperis. Katolikaj presaĵoj en E-o konstante aperas. Eble ne ennome de IKUE, sed IKUE-anoj silente daŭrigas sian laboron por la evangelizado: oni ariĝas, oni preĝas, oni ĉeestas ĉie per Esperanto kaj donas ateston en la mondo; en la Interreto, ekzemple, per la provizado de la arkivo de la elsendoj en E-o de Radio Vatikana; la vorton Esperanton oni daŭre legas dum tutmonda televida elsendo okaze de Pasko kaj Kristnasko kaj pri tio informas la paĝaro de IKUE per nekredebla rapideco, minutojn post ĝia okazigo kvankam ne temas pri iniciato de IKUE. Multaj katolikaj kaj kristanaj asocioj neesperantistaj invitas IKUE'n al siaj aranĝoj. Abundas iniciatoj de katolikaj gefratoj tra la mondo, kiujn la estraranoj kaj membroj de IKUE subtenas. Ktp ktp ktp.

Ni danku la Providencon, kiu donas eksterordinaran atenton al ni kaj humile ni agnosku niajn limojn. Problemegoj daŭre staras antaŭ IKUE. Ni dankeme preĝu dirante: "Kiuj ni estas, ho Sinjoro, por ke Vi zorgu pri ni? Sed ni fidas je Viaj vojoj".

*cs*

Ne estis ankoraŭ presitaj jenaj numeroj de Espero Katolika: jarkolekto 2009, n-ro 10/12. Jarkolekto 2010: de 1 ĝis 9. Jarkolekto 2011: de 7 ĝis 12 (entute, 6 kajeroj). La nova Estraro de IKUE intencas labori por ilia publikigo sed ĉefe por regula apero de nia revuo, kiu ĉi-jare fariĝas 109-jaraĝa kaj daŭre ĝi estas la plej malnova daŭre aperanta E-revuo. La pacienco, kiu karakterizis ĝis nun la abontantaron, certe eltenos ankoraŭ iomete da atendo. Kaj oni esperas, ke, por la solvo de la nunaj problemoj, kontribuos ĉiuj, per preĝado, per mondonacoj kaj per trovo de novaj membroj. Dankon!




# "EDUKI LA JUNULOJN AL JUSTECO KAJ PACO"

La temo pri la eduko al paco kaj la kunaktivigo de la junularo ne estas novaĵo por la monda tago de la unua de januaro. Papo Paŭlo la 6a por la 3a monda tago en 1970 dediĉis sian mesaĝon al la temo: *"Edukiĝi al paco pere de repaciĝo".* Lia posteulo Johano Paŭlo la 2a en 1979 elektis la temon: *"Por atingi la pacon, eduku al la paco",* kiun li denove pritraktis en 1985 per: *"La paco kaj la junuloj marŝas kune"* kaj en 2004 per: *"Sindevigo ĉiam aktuala: eduki al la paco".*

La nuna Papo, ree proponante la temon, intencas eniri la kernon de urĝa problemo en la hodiaŭa mondo: aŭskulti kaj valorigi la novajn generaciojn en la realigado de la komuna bono kaj en la enradikiĝo de socia ordo justa kaj pacema, kie estu plene manifestataj kaj realigitaj la fundamentaj rajtoj kaj liberecoj de la homaro.

Resume.

La mesaĝo komenciĝas rimarkante la malfacilaĵojn de la hodiaŭaj gejunuloj, kiel: estigi familion, trovi stabilan laborpostenon, doni sian kontribuon en la mondoj de politiko, de kulturo, de ekonomio por la konstruo de socio humaneca.

La Papo alvokas al diversaj grupoj: al la respondeculoj pri la edukado, unue al la gepatroj, kiuj estas la unuaj edukantoj, ĉar en la familio la gefiloj lernas la valorojn homajn kaj kristanajn, kiuj permesas kunvivadon konstruan kaj pacan; al la respondeculoj de la edukaj institucioj, por ke la digno de ĉiu homo estu respektata kaj valorigata; al la politikistoj, por ke ili helpu konkrete la familiojn kaj la edukajn instituciojn; al la mondo de la amaskomunikiloj, ĉar estas strikta la kunligo inter la edukado kaj la komunikado. Plia papa alvoko estas adresita al la gejunuloj mem per la invito, ke ili saĝe uzu sian liberecon.

En la tria parto de sia mesaĝo Benedikto la 16a skribas pri la celoj de la edukado.

<u>Eduki al la vero kaj al la libero</u>, rekonante en ĉiu homo la bildon de la Kreinto, kontraŭ la kulturo de la relativismo, kiu, ne rekonante definitivajn valorojn, lasas ĉiun sub la regado de ties kapricoj.

<u>Eduki al la justeco</u>, kontraŭ la fluoj de la moderna kulturo bazita sur ekonomiaj principoj racionalistaj kaj individuistaj, kiuj apartigas la justecon disde solidareco kaj karitato.

<u>Eduki al la paco</u>, kiu ne estas nur manko de milito, sed ankaŭ defendo de la personaj havaĵoj, libereco, respekto de ĉies digno kaj frateco.

La mesaĝo finiĝas kun la instigo levi la okulojn al Dio, ĉar ne estas la ideologioj tiuj, kiuj savas la mondon, sed la vivanta Dio, eterna amo, garantianto de nia libereco.

*(el Katolika Sento)*

## *“Ni ĉiuj estos ŝanĝitaj de la venko de Jesuo Kristo, nia Sinjoro”*

### Preĝosemajno por la unueco de la Kristanoj (18-25a de januaro 2012)
### Kontribuo de la esperantistoj

**La semajno.** Ĉiujare, de la 18a ĝis la 25a de januaro, t.e. inter la festotagoj de la “Katedro de Petro” (aŭ de la “Konfeso de Petro”, laŭ la protestantoj) kaj tiu de la “Konvertiĝo de Sankta Paŭlo”, oni solenas en ĉiuj kristanaj komunumoj, oktagon da preĝoj por la unueco de la Kristanoj. Ĉi tiu celebrado, kiu ripetiĝas jam de pli ol unu jarcento, arigas kristanojn katolikajn, ortodoksajn kaj protestantajn en komuna preĝado por la unueco. La temo de la ĉi-jara preĝado rilatas la lastajn versiklojn de la 15a ĉapitro de la unua letero de Sankta Paŭlo al la Korintanoj, tiel resumitaj: “Ni ĉiuj estos ŝanĝitaj de la venko de Jesuo Kristo, nia Sinjoro”. Ĉiu el ni estas alvokata en ĉi tiu tempo unuigi sian preĝon al tiu de la kristanoj de la tuta mondo, laŭ la preĝo, kiun Kristo mem adresis al Patro: “por ke ili estu unu” (Joh 17,11).

**La Papo.** “Unuigitaj en Kristo ni estas vokataj kundividi lian mision”, t.e. “alporti la esperon tien, kie regas maljusteco, malamo kaj senesperiĝo”. Ĝi estas la fina celatingo de la plena unueco de la kristanoj, laŭ la vortoj eldiritaj de Benedikto la 16a en la roma baziliko de sankta Paŭlo ekster la muregoj ferme de la ĉi-jara preĝosemajno por la unueco. En la jaro kiam oni solenos la 50an datrevenon de la malfermo de la 2a vatikana Koncilio – diris la Papo – “kvankam spertante en niaj tagoj la doloran situacion de divido ni, la kristanoj povas kaj devas rigardi al la estonteco kun espero”, ĉar – li klarigis – “la venko de Kristo signifas superon de ĉio, kio malebligas al ni kundividi la vivoplenecon kun Li kaj kun la aliuloj”. Aliflanke la Resurekto de Jesuo Kristo “konfirmas, ke la bono de Dio venkas la malbonon, ke la amo superas la morton”. “Li – aldonis la Papo – nin akompanas dum la lukto kontraŭ la detruanta forto de pekado, kiu damaĝas la homaron kaj la tutan kreaĵaron de Dio”.

**La esperantistoj.** Ĉi tiu preĝosemajno estas tre apuda al la ekumena inspiro de nia asocio. Ĉi-jare laŭ iniciato de la vicprezidantino de IKUE Marija Belošević estis realigita la traduko en E-o de la tekstoj aprobitaj de la Papa konsilio por la akcelo de la unueco de la kristanoj kaj de la Komisiono “Fido kaj Konstitucio” de la tutmonda Konsilio de Eklezioj (WCC). La traduko estas komuna laboro de dekduopo da bonvolaj personoj, kiuj per disponigo de sia libera tempo ankaŭ montris propran elekton: esti guteto en la maro da deziroj “ke ĉiuj estu unu”.

Tradukis IKUE-anoj kaj aliaj bonvolaj Esperantistoj: Antonio De Salvo, Italio; Bernard Schwaiger, Germanio; Bogusław Sobol, Pollando; Daniel Chevalier, Francio; Doris Legat, Aŭstrio; Giovanni Daminelli, Italio; Karl Reinisch kaj la E-grupo en Graz, Aŭstrio; Louis Jeuland, Francio; Luz Vauquez, Hispanio; Marija Belošević, Kroatio; Mike Leon, Novzelando; Pavol Petrik, Slovakio. Reviziis: Antonio De Salvo. Kompilis kaj grafike aranĝis Marija Belošević

Oni disponigis la frukton de tia grava laboro en la interreta paĝaro de IKUE. Oni povas senpage deŝuti la libreton laŭ enpaĝigita versio (post presigo, Vi povas faldi ĝin kaj havi libreton) aŭ la tekstojn laŭ vertikala sinsekvo de la paĝoj.

Adreso: http://www.ikue.org/ekumenismo/preghosemajno/semajno2012.htm



## Sinprezento de la nova IKUE-prezidanto

Mi estas Giovanni Daminelli la nova prezidanto de IKUE. Eble ne multaj konas min en la internacia IKUE-rondo kaj tio pro la fakto ke mi lernis E-on antaŭ ne multaj jaroj, kaj ke mi ĉefe laboris en la itala movado. Sincere mi konfesas, ke multaj aspektoj de la vivo de Unuiĝo estas por ni nekonataj. Kial do mi akceptis kandidatiĝi por ĉi tiu tasko? La insisto de kelkaj samideanoj, kiuj firme kaj afable petis tion, konvinkis min. Eble mi ne estas la plej taŭga persono - pri tio mi konscias - sed devas esti ja iu, kiu surprenas ĉi tiun ŝarĝon. Tamen, mi konfidas en la dia helpo, ĉar ni scias, ke Li por realigi siajn projektojn elektas plej ofte la ŝajne malplej dignajn, por ke ili estu simpla ilo en Liaj manoj.

Ĉi tiun koncepton certe pli bone ol mi esprimis Chiara Lubich: *«Skribilo ne scias tion, kion ĝi devos skribi. Peniko ne scias, kion ĝi devos pentri. Same, kiam Dio prenas en siajn manojn kreitaĵon por estigi en la Eklezio iun Sian verkon, la persono ne scias, kion li devos fari. Li estas ilo. La iloj de Dio kutime havas karakterizon: la eteco, la malforteco "por ke neniu karno fieru antaŭ Dio" (1Kor 1,29). Kaj dum la ilo moviĝas en la manoj de Dio, Li formas lin per mil kaj mil doloraj kaj feliĉaj sagacaj solvoj. Tial Li igas lin pli kaj pli celtaŭga por la laboro, kiun li devas plenumi. Kaj li povas diri konscie: mi estas nenio, Dio estas ĉio».*

En tiu senso, mi volas akiri la profesiecon, kiun mi nun ankoraŭ ne havas: atenti la signojn de la dia volo, kaj lasi ke Li konduku min. Por tio mi petas preĝon de ĉiuj kaj helpon precipe, sed ne nur, de la nova estraro. Krome mi estos dankema al tiuj, kiuj frate rimarkigos al mi kelkajn miajn eblajn erarojn aŭ mankojn, tio helpos min plibonigi mian servon.

Al miaj antaŭuloj mi adresas mian profundan dankemon kaj admiron: al pastro Duilio Magnani, Antonio De Salvo kaj Miloslav Šváček; unue al ili nur pro la fakto, ke ili estas tiuj, kiujn mi povis persone koni, sed miaj dankemo kaj admiro koncernas ĉiujn "ilojn" kiuj aktivis kaj aktivas en nia IKUE. Dankon ankaŭ al ĉiuj antaŭaj Estraranoj kiuj ne estas en la nuna Estraro: mi konfidas, ke ili daŭrigos alporti sian valoran kontribuon.

**Giovanni DAMINELLI**

### La Papo: "la neĝo estas bela, sed ni esperu, ke baldaŭ alvenos printempo"

*La 2an kaj 3an februaro 2012 intensa neĝado blankigis Romon dum pluraj horoj: 15 centimetroj en la centro; 20 ĝis 25 centimetroj en la periferiaj kvartaloj. La infrastrukturoj kaj la loĝantoj, ne kutimiĝintaj je neĝo (ĝi falis laste en 1986) ne eltenis la situacion kaj pro tio ĥaoso regis Romon kaj ĝian provincon, kun multe da malagrablaĵoj. Kiuj povis iel elturniĝi, tiuj ĝuis raran spektaklon. La blanko de la neĝo kovris ĉion, kun nekutima bildo de Romo. La problemoj daŭris en la postaj tagoj, kiam la akumuliĝinta neĝo fariĝis glacio. Por reveni hejmen la redaktoro de la E-lingva elsendo piediris malrapidege dum unu horo kaj duono por trairi 1,2 kilometrojn el la sidejo de Radio Vatikana kaj li ne evitis danĝerajn ekglitiĝojn.*








*Ankaŭ la Papo aperis je la fenestro de sia kabineto por rigardi la neĝadon. Lia eldiro, kiun ni metis titole de ĉi tiu artikoleto, bone resumis ĉies sentojn kaj enhavis pli profundan signifon: "neĝo estas bela, sed ni esperu, ke baldaŭ alvenos printempo".*

La 29an de januaro 2012 forpasis la emerita prezidanto de la itala Respubliko, hon. Oscar Luigi Scalfaro. Li plurfoje elmontris simpation al la esperantista movado, kiel raportas ĉi tiu artikolo.



## "Dankon pro viaj celoj, viaj pensoj, via volo"

En almenaŭ tri okazoj mi persone spertis la simpation de prezidanto Scalfaro favore al esperanto. En 1967, kiam li estis ministro pri transportoj, li aranĝis ke en la oficiala horaro de la italaj fervojoj aperu la "ĝeneralaj informoj" ankaŭ en esperanto. En 1973, kiel ministro pri publika instruado, li akceptis min kaj la tiaman prezidanton de itala E-Federacio, prof-ro Mario Dazzini, deklarante sin preta favori la instruadon de esperanto en la lernejoj pere de ministeria dispozicio (la rezulto estis poste nula pro la insisto de iuj esperantistoj enkonduki esperanton en la lernejojn nur pere de ŝtata leĝo). Kiam li estis prezidanto de la Respubliko li faris sian plej rimarkindan publikan deklaron favore al esperantistoj, akceptante aŭdience la 300 partoprenantojn de la 50a IKUE-kongreso 1997 en la prezidanta palaco *del Quirinale* en Romo.

La fotografio montras momenton de tiu aŭdienco, kiam mi, kiel tiama prezidanto de IKUE, adresis al li salutmesaĝon en la itala kaj en esperanto. Dekstre staris mons-ro Giovanni Locatelli, tiama episkopo de Rimini kaj granda amiko de esperanto, kaj prof-ro Mario Sola, prezidanto de la itala IKUE-sekcio kaj persona amiko de prezidanto Scalfaro.



Responde al mia saluto, Scalfaro respondis per jenaj improvizitaj vortoj:

*Mi dankas Vin, kara Prezidanto [De Salvo], pro la saluto.*
*Mi dankas Lian Ekscelencan Moŝton [Episkopon Locatelli], pri kiu mi ne sciis, ke li estas tiom eminenta ... animzorganto de la esperantistoj.*
*Mi salutas Vin ĉiujn.*

*Vi konsentos al mi doni saluton, partianece amikan, al profesoro advokato Sola, kun kiu ni estas amikoj ab immemorabili [ekde nememorebla tempo]; kaj amikecoj, kiam pasis la tempo, estas pli parfumitaj, pli konsolodonaj.*

*Saluton al ĉiu unuope kaj al ĉiuj.*

*Mi konstatas, ke estas meze de vi ankaŭ pastroj kaj religiuloj el diversaj ritoj; sekve, esperanto utilas ankaŭ por ekumena dialogo ...*

*Mi ŝuldas al vi dank-esprimon, ĉar, dum la ĉiutagaj dialogoj - mi ĵus finis unu antaŭ ol veni al vi - oni ĉiam, aŭ multfoje, parolas pri repaciĝo, en diversaj sektoroj kaj por diversaj problemoj. Kaj se ne pri repaciĝo, oni parolas pri trovo de interkonsento, de akordo pri iu problemo, pri iu batalo, pri iu temo.*

*Samtempe, ĉi tiuj renkontoj, ĉi tiuj dialogoj kaj kolokvoj alportas ankaŭ rompojn, polemikojn, dividojn.*

*Nu, mia danko ŝuldiĝas al fakto, ke via ĉeesto reelvokas por mi nur la unuajn temojn, t.e. la temoj pri interkonsento, pri parolo de la sama lingvo, pri trovo de frateco.*

*Jen la plej grava temo de ĉiuj historiaj periodoj kaj, certe, de la periodo kiun ni travivas.*

*Tamen, necesas doni precizigon. Paroli la saman lingvon ne signifas esti, aŭtomate, en konsento.*

***OSCAR LUIGI SCALFARO (naskita en Novara, la 9an de septembro 1918 kaj mortinta en Romo la 29an de januaro 2012) estis itala politikisto kaj juĝisto, naŭa prezidanto de la itala Respubliko ekde 1992 ĝis 1999. Antaŭ la prezidanteco li estis seninterrompe parlamentano ekde la naskiĝo de la itala Respubliko en 1946. Nur 2 aliaj prezidantoj okupis kiel li la tri plej altajn rangojn de la Ŝtato: li estis prezidanto de la Respubliko kaj de la Ĉambro de la deputitoj kaj provizora prezidanto de la Senato.***

*Kiom da familioj rompiĝas ĉe geedzoj, kiuj parolas la saman lingvon, foje la saman dialekton?*

*Kiomfoje estas starpunktoj, ne nur polemikoj, dialektike malmolaj, sed drastaj kontrastoj – sekve kontraŭ frateco kaj amikeco - ĉe personoj kiuj havas la saman lingvon, kiuj apartenas al la sama lando, al la sama familio?*

*Tiam, mia danko rilatas, jes, al tiu via kapablo kultivi esperanton kiel komunan lingvon, sed mia danko rilatas, ĉefe, viajn intencojn, viajn pensojn, vian volon.*

*Vi alfrontis la studon de esperanto ne nur por paroli komunan lingvon, sed vi alfrontis ĝin per la penso, per la volo, kun la ideo de frateco, de komunumo, de la ebleco de interkonsento inter la popoloj.*

*Tiam, en tio kuŝas mia danko kaj en tio, la bondeziro ke vi daŭrigu, por esti daŭra mesaĝo de frateco, amikeco, solidareco, amo.*

*Kaj mi salutas vin ĉiujn kun amemo!*

Alia publika kontakto de Scalfaro kun la esperantistoj estis tiu de la 24a de oktobro 1999, kiam li, fariĝinta dumviva senatano kiel ĉiuj eksaj prezidantoj, partoprenis en publika ceremonio ĉe la E-grupo de Vercelli por omaĝi al sia amiko esperantisto Mario Sola, forpasinta la antaŭan jaron.

**Antonio DE SALVO**

# 65a IKUE KONGRESO
## 14a ĝis 21 de julio 2012, Pécs, Hungario

Ĉefa temo: "MI KREDAS JE UNU DIO"

*(ligita al la jaro de la Kredo: 2012-2013)*

Papo Benedikto la 16a starigis la "Jaron de la Kredo" kiu estu favora okazo por ke ĉiuj fideluloj komprenu pli profunde la fundamenton de la kristana kredo kaj la certecon de la kompleta kredo de la Eklezio, fronte al la necertecoj proponataj de la nunaj historia periodo kaj socio.

La klareco kaj la beleco de la kredo iĝas lumanta la vivon de la homo ankaŭ hodiaŭ! Kaj tio okazas aparte kiam ĝin prezentas entuziasmaj kaj entuziasmodonaj atestantoj.

Ankaŭ ni, esperantistaj katolikoj, estas vokataj doni ĉi tiun ateston, ne simple ĉar ni estas membroj de asocio oficiale agnoskita de la Eklezio, sed ĉefe kiel kristanoj kiuj devas disvastigi mesaĝon de espero. Temas pri tasko ne facila: necesas pli konvinkita sindevigo por remalkovri la ĝojon kredi kaj por retrovi la entuziasmon.

Al tio strebos nia kongreso: disponigi, dank' al niaj paŝtistoj kaj kleruloj, la eblecon kompreni la irendan vojon; interŝanĝi spertojn; eklerni el la paŝtista instruo de la Eklezio kaj ankaŭ klopodi distingi la manieron laŭ kiu ni povas kontribui al la nova evangelizado surbaze de nia aparta karakterizo – la uzo de la Internacia lingvo. Nin helpos certe la partopreno en la Eŭkaristio, la preĝado kaj la religiaj meditoj, kiuj akompanos kaj kronos niajn kongresajn tagojn.

La espero estas, ke nia arigo povu doni al ni pli kaj pli grandan konscion, ke ankaŭ ni - kiel laikoj, kiel kredantoj kaj kiel esperantistoj - havas nemalhaveblan rolon en la misio de la Eklezio, kaj ke el spirite riĉa kunestado povu naskiĝi nova elano kiu realigu iniciatojn kaj programojn kiuj helpu nin ĉiujn daŭrigi nian ateston.

**LA KONGRESEJO:** Cisterciana gimnazio kaj kolegio (en la centro de la urbo proksime al la katedralo) http://www.crnl.hu/esemenyek/2008/madartavlat/madartavlat.html
Je nia dispono estos: dormejoj 2-, 3- kaj 4-litaj (necesejo kaj banĉambro surkoridore); salono por la komunaj programoj; kapelo; manĝejo; proksime estas hotelo kaj alia loĝdomo.

**LA KONGRESURBO:** Pécs, suda Hungario (Eŭropa urbo de kulturo, 2010) http://eo.wikipedia.org/wiki/Pécs

**AKTUALAJ INFORMOJ:** oficiala IKUE ttt-ejo: www.ikue.org/kong2012 — Esperanto-elsendo de Radio Vatikana: www.radiovaticana.org

**ATINGEBLECOJ:** trajno el direkto de **Budapeŝto**, rekta (iom malpli ol 3 horoj); **Vieno** (tra Budapeŝto, de 6 horoj), **Brno** (tra Budapeŝto, de 8,5 horoj), **Zagrebo** (kun unu ŝanĝo en Gyékényes, 5 horojn).
autoŝoseo: urbo troviĝas ĉe la ĉefa ŝoseo al/de Budapeŝto kaj same bonaj vojoj al la okcidento
aviadilo: tra Budapeŝto kaj tra Zagrebo.

**PROVIZORA KONGRESA PROGRAMO:** *Unua oficiala servo: vespermanĝo la 14an de julio, lasta oficiala servo: tagmanĝo, la 21an de julio*

***sabato, 14/07:*** *alveno de kongresanoj ĝis la 14a horo; akcepto kaj loĝigo; meso;* ***19.30a horo*** *inaŭguro kun la ĉeesto de d-ro György Udvardy, episkopo de Pécs, kaj lia enkonduka prelego. —* ***dimanĉo, 15/07:*** *prelegoj, meso, koncerto —* ***lundo, 16/07:*** *pilgrimo al la baziliko Mariagyüd kaj Siklós, Villány —* ***mardo, 17/07:*** *ĝenerala kunveno de IKUE, Krucvojo sur*

*la monteto, koncerto — **merkredo, 18/07:** prelegoj, libera posttagmezo — **ĵaŭdo, 19/07:** prelegoj, pilgrimo — **vendredo, 20/07:** prelegoj, adiaŭa vespero — **sabato, 21/07:** dankmeso, fermo de la kongreso, foriro dum posttagmezo.*

**Ĉiutage estos enprogramitaj Matenaj laŭdoj, Rozario, Vesperaj Preĝoj, Kompletorio.**

*Noto: la programo estas provizora, ĉar necesas fintraktoj de la horoj pri eksterkongresejaj mesoj kaj aliaj vizitoj. Do, eblas ŝanĝo inter la tagoj.*

***Programkontribuo:** se vi volas kontribui al la tema parto de la programo, bv. klare skribi al kiu subteno rilatas via kontribuo. Krome, bv. sendi ĝis dek frazan resumon de la kontribuo antaŭ la 1a de majo. Se via kontribuo estos listigita en la programo, ĝi povus daŭri ĝis 25' kaj vi estos petata liveri skriban version de la prelego por posta aperigo. Surloke eblus uzi ĉiujn teknikilojn. Tamen, bv. informi kion vi bezonus kaj per kiu programo vi pretigos ĝin, por ke la prezento estu kiel eble plej glata.*

## KOTIZTABELOJ *(ĉiuj prezoj estas esprimataj en Eŭroj €)*

**Tarifo A:** iamaj socialismaj landoj de Eŭropo (escepte de Slovenio); ĉiuj landoj de Azio (escepte de Arabio, Israelo, Japanio, Malajzio, Sudkoreia Respubliko), Afriko (escepte de Sudafriko), Latina Ameriko, Oceanio (escepte de Aŭstralio, transmaraj teritorioj de Francio).

**Tarifo B:** Ĉiuj mondaj landoj ne inkluzivitaj sub A.

| KONGRESA ALIĜKOTIZO *(nerepagebla nek transdonebla!)* | | |
|---|---|---|
| | **Tarifo A** | **Tarifo B** |
| **ĝis la 5-a de junio 2012** | 20 € | 50 € |
| **de la 6-a de junio 2012** | 40 € | 70 € |
| **parta partopreno taga** | 8 € | 10 € |
| **parta partopreno/pilgrimtago** | 25 € | 25 € |
| **Apogkotizo:** 50% de la kotizo valida post la 1a de majo *(oni ne partoprenas la kongreson, sed ricevas la kongresan dosieron)* | | |
| Infanoj ĝis 8 jaroj aliĝas senpage. Ne IKUEanoj krompagas la aliĝkotizon 10 € pli por plena partopreno | | |

La menciitaj kostoj ne inkluzivas asekuron!

| priskribo de la ĉambro | Tarifo A | Tarifo B |
|---|---|---|
| **4-lita ĉambro[1]** | 150 € | 180 € |
| **3-lita ĉambro[1]** | 165 € | 198 € |
| **2-lita ĉambro kun duŝo[2]** | 210 € | 252 € |
| **1-lita ĉambro en hotelo** | 275 € | 320 € |
| **2-lita ĉambro en hotelo** | 240 € | 280 € |
| **3-lita ĉambro en hotelo** | 230 € | 270 € |

[1] banĉambro kaj necesejo komuna - [2] apuda domo

**Prezo inkluzivas:** 7 tranoktojn; 6 vespermanĝojn; 7 matenmanĝojn; 7 tagmanĝojn, bustransporton dum pilgrimadoj kaj necesajn enirbiletojn.

**Partaj partoprenantoj - manĝoj en la kongresejo:** tagmanĝo: 3 €; vespermanĝojn: 3 €; tag/kaj vespermanĝoj por la tuta kongreso: 35 €

***Se vi interesiĝas pri la hotelaj loĝeblecoj en la proksimeco de la kongresejo, bv. tion kiel eble plej rapide komuniki al la organizantoj.***

***La restadkostoj estas faritaj surbaze de la solidara principo. Do, iuj pagas pli, por ke aliaj pagu malpli.***

## Jam 54 gefratoj aliĝis. Ĉu Vi?



*Pécs: cisterciana gimnazio kaj kolegio, nia kongresejo.*

### *ĜENERALAJ INSTRUKCIOJ, bv. atente legi:*

- *La aliĝo validas post la ricevo kaj de la aliĝilo kaj de la aliĝkotizo. Ĉiuj aliĝintoj ricevos la konfirmon pri la aliĝilo kaj informojn kiel atingi la kongresejon.*
- *La mendo de la loĝado (kompleta) estos traktata nur post la alveno de la NEPRA antaŭpago de 20%.*
- *Prioritaton en la mendo de du-litaj ĉambroj havoj geedzoj.*
- *Ni ne povos trakti hazardajn kunloĝantojn en 2-litaj ĉambroj.*
- *Post ricevo de la mendo la organizantoj tuj komunikos al vi ĉu de vi elektita kategorio jam estas plene okupita.*
- *En kazo de ne alveno, NUR la antaŭpago por la loĝservoj estas transdonebla al alia persono, kondiĉe ke tiu regule aliĝis kaj pagis la aliĝkotizon.*
- *Reston de la sumo oni povas pagi al la banka konto, aŭ surloke nur per kontanta mono, en eŭroj (ĉekoj kaj kreditkartoj surloke ne estos akcepteblaj).*
- *La antaŭpago por la loĝservo pro la nealveno estos redonita, nur en la kazo se oni sukcesos plenigi/anstataŭigi jam pli frue rezervitan lokon.*
- *De la redonita sumo pro organizaj kialoj oni forprenas 10 €.*
- *La aparte menciitaj kostoj de la tag- kaj vespermanĝoj rilatas al tiuj kongresanoj kiuj loĝos aliloke kaj deziras ĉeesti la komuna(j)n manĝo(j)n. Tiuj kiuj jam ĉe la aliĝo estas certaj por kiuj tagoj ili deziras rezervi manĝojn indiku tion. Kvankam eblus surloke (tagon pli frue) rezervi la unuopan manĝon, pro organizaj demandoj, ni petas ke oni maksimume ĝis la 1/07/2012 komuniku deziron pri manĝoj.*

### *PAGMANIEROJ*

**BANKO:** pere de la itala poŝt-banka konto: IBAN: IT34 H076 0103 2000 0002 3290 000 - BIC/SWIFT: BPPIITRRXXX je nomo: UNIONE INTERNAZIONALE CATTOLICA ESPERANTISTA. Adreso: *Via di Porta Fabbrica 15, IT-00165 ROMA-RM (Italia). Atentu! Oni skribu precize la nomon: “Unione internazionale cattolica esperantista”. Oni ne uzu mallongigojn, nek la siglon IKUE, nek alian akronimon:* ***oni riskas, ke la pago ne estu farita.*** *Eŭropanoj de la landoj kies bankoj aliĝas al sistemo “SEPA” ne pagas komisiojn por alsendi la monon. Oni petu informojn ĉe sia banko;*

**UEA:** ***konto*** *“ikue-v” de Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista - Romo, Italio*

*Oni ne FORGESU skribi la kialon de la pago.*

## *65a IKUE KONGRES0*
## *Pecs, Hungario, 14. – 21. 07. 2012.*

### ALIĜILO KAJ MENDILO

**Sendu rete al: ikuekongreso@gmail.com, fakse: +385 1 37 45 052 aŭ per ordinara poŝto al la adreso: Marija Belošević, Sveti Duh 130, HR-10000 Zagreb, Kroatio**

*Ĉiu aliĝinto uzu apartan aliĝilon. La aliĝilon/mendilon bv. plenigi preslitere.*

| | |
|---|---|
| **PERSONA(J) NOMO(J)** | **FAMILIA NOMO** |
| **ADRESO (strato, domnumero)** | **poŝtkodo, urbo, ŝtato** |
| **NASKIĜDATO** | **TELEFONO** |
| **RETADRESO** | **FAKSO** |
| **Mi estas vegetarano: JES NE** | **Mi estas handikapito: JES NE** |
| **Mi planas alveni (dato, transportilo)** | **Mi planas forveturi (dato, transportilo)** |
| **Mi mendas servojn (metu ☑)**<br>**4-lita ĉambro ☐**<br>**3-lita ĉambro ☐**<br>**2-lita ĉambro kun duŝo ☐**<br>**1-lita ĉambro en la hotelo ☐**<br>**2-lita ĉambro en la hotelo ☐**<br>**3-lita ĉambro en la hotelo ☐** | **Mi estas parta partoprenanto kaj mi mendas manĝojn por la tagoj:**<br>**tagmanĝoj:**<br><br>**vespermanĝoj:**<br><br>**pilgrimoj:** |
| **Mi deziras dividi ĉambron kun** | |
| **Mi havas apartan dieton** | |
| **Al la programo mi pretas kontribui per** | |
| *Noto:* | |

Mi pagas:

- Kongreskotizon = ____ EUR
- Loĝservojn/antaŭpagon = ____ EUR
- Libervola kontribuo al la Kongresa Kaso = ____ EUR
- SUME = ____ EUR

Antaŭpagon de ____ EUR mi ĝiris al la:

**☐ Banka konto de IKUE**
**☐ UEA konto de IKUE**

Dato: __________________ Subskribo: __________________

## 7 - 11 /03/2012: Bibliaj Tagoj en la urbo de la Trenta Koncilio



Inter la 7a ĝis 11a de Marto okazis la nunjaraj Bibliaj Tagoj en Trento (Italio) laŭ la invito de lokaj Esperantistoj en la Sanktejo *Madonna delle Laste.* Alvenis 23 partoprenantoj el la 5 landoj Ĉeĥujo, Germanujo, Kroatujo, Italujo kaj Slovakujo. La programo enhavis kaj bibliajn studojn, kaj preskaŭ ĉiutage kantojn surbaze de nia ADORU, kaj ekskursojn al urbo Trento mem kaj ties ĉirkaŭaĵo ĝis eĉ la Lago de Garda en urbo Riva.

La spiritan gvidadon faris **patro Willibald Kunigk OSB** el la monaĥejo Nütschau apud Hamburgo, kiu en tiu ĉi jaro traktis precipe la okan ĉapitron de la Letero al la Romanoj de Apostolo Paŭlo. La kantekzercojn gvidis Stefan Lepping, organisto el urbo Werl/Germanujo.

La alvojaĝintoj estis bone traktataj en la monaĥejo mem, oni dormis bone, manĝis bone kaj ĝuis la proprajn ĉambrojn kaj la aliajn ofertojn de la domo kiel kapelo, seminariejo aŭ la parksimilaj ĝardenoj ĉirkaŭ la konstruaĵoj.

Krom la bibliaj studoj la urbo





Sanktejo Madonna delle Laste.

Trento estis de komuna intereso pro tio, ĉar en la jaro 1545 komenciĝis tie la Koncilio de Trento aŭ Trenta Koncilio, kiu estis la triantaŭlasta ekumena koncilio de la katolika eklezio, malfermita de la tiama Papo Paŭlo la 3a. Per tiu Koncilio estis difinita la reformo de la eklezio (katolika Reformacio) kaj precizigitaj la kredreguloj kontraŭ la doktrino de kalvinismo kaj luteranismo (protestanta Reformacio).

Bedaŭrinde la koncilio ne sukcesis restarigi eklezian unuecon per la reformacio. Tamen, Trento absolute ne estas nur simbolo de disiĝo aŭ disbrakiĝo. Post la dua Vatikana koncilio Papo Paŭlo la 6a diris al la diocezo de Trento, ke speciale ĝi nun malfermu sin kaj klopodu por unueco inter la eklezioj. En Trento estiĝis renoma ekumena Centro Bernardo Clesio. La Centro montras rimarkindajn rilatojn al diversaj eklezioj protestantaj kaj ortodoksaj tutmonde. Sekve estiĝis en la Diocezo de Trento en la pasintaj jardekoj ankaŭ kristanaj komunumoj de aliaj konfesioj ol la katolika. Du el ili la grupo vizitis vendrede kaj sabate, unu evangelianan kaj unu ortodoksan. Okazis kun ties estroj diservo resp. edifa preĝado, por iomete sperti ilian manieron celebri la mesaĝon de la Biblio.

Ekskursante tra Trento ni vizitis la ĉarman urbokernon, la koncilian katedralon, la diocezan muzeon kaj vespere ni preĝis komune la Vespron en la preĝejo de Sankta Lorenco.

Unu tagon poste ni atingis antaŭtagmeze la Ekumenan Centron kaj aŭdis la historion de la Ekumena



Luterana preĝejo “Sankta Triunuo“ en urbo Arco.

Centro fare de s-ro Martinelli, la afergvidanto kaj ni konatiĝis kun la episkopa anstataŭanto tie. Posttagmeze sekvis busekskurso unue al urbo Arco, kie ni havis plenan evangelian diservon kun la loka germana pastro. Ties predikon majstre tradukis preskaŭ samtempe Stefan Lepping.

Poste okazis pluveturo al urbeto Riva ĉe la Garda Lago.



La alian tagon ni buse veturis al la najbara urbo Rovereto, kie troviĝas impona **Sonorilo de la militfalintoj (aŭ de la Paco)** kun aleo de flagoj de ĉiuj nacioj de la mondo, kaj najbara kleriga Centro, kiu montris draste la terurajn sekvojn de militado niatempe kaj la bezonon de interpaciĝo.

Poste ni renkontis la **popon de ortodoksa preĝejo** en Rovereto.



Li benis nin per kantita beno kun du kantistinoj, kiuj asistis lin en ortodoksaj himnoj en la lingvoj rusa (praslava), rumana kaj itala. Ni ĉiuj estis aldone benitaj per sankta oleo, tenante kandelojn en niaj manoj.

Ni montris nian dankon pere de ortodoksa himno el ADORU, kiun ni Esperante kantis komune kun popo kaj kantistinoj. Do montriĝis, kiom bona nia ADORU estas – vere ekumene uzebla.

Bedaŭrinde estis, ke nur malmultaj evangelianoj partoprenis. Ili preterlasis interesajn tagojn en vere ekumena etoso. Mi volas instigi ĉiujn, partopreni en la venontaj Bibliaj Tagoj, kiuj post Münster kaj Werl ĉiam meritis kunan vivadon en ekumena gefrateco.

**Karl Heinz SCHÄFFER**

*fotoj de Giovanni Daminelli, Carlo Sarandrea kaj Ugo Tonini.*

# BALOTOJ IKUE 2011

## OFICIALA PROTOKOLO PRI LA REZULTO

La 20an de februaro 2012, je horo 14.30, en la domo de familio Sato Lipari en Romo ariĝis la Balota Komisiono por kalkuli la balotilojn senditajn kaj la voĉdonojn esprimitajn de la membraro por la elekto de la Prezidanto, de la Estraro kaj de la Konsilio de la Kontorevizoroj, de Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista IKUE, de ĉi tie antaŭen nomata “Unuiĝo”.

La Balota Komisiono konsistas el: S-rino Michela Lipari (Prezidantino), S-ro Yasuo Sato (kontrolanto), S-ro Giorgio Denti (kontrolanto). Ĉeestas la sekretario de la Unuiĝo, S-ro Carlo Sarandrea, kiu liveras al la Balota Komisiono la liston de la voĉdonrajtaj membroj, kiel ĝi rezultas el la aliĝoj por la jaro 2011. Aparte, Sarandrea sciigas ke oni alsendis 454 balotilojn, kaj ke 2 balotiloj revenis al sendinto kun indiko “adresato nekonata” kaj ke sekve la du nomoj estis forigitaj el la totalo de la voĉdonrajtaj membroj.

La Prezidantino de la Balota Komisiono kalkulas la nombron da leteroj kun balotiloj, alvenintaj ene de la dat-limo fiksita por la baloto, tio estas, horo 13a de la 31a de januaro 2012. Alvenis entute 249 leteroj. Por la kalkulo de la validaj voĉoj oni forigas el la totalo 2 leterojn, kiuj alvenis post la dat-limo fiksita por la baloto, tio estas, horo 13a de la 31a de januaro 2012, plus unu letero, kiu ne surhavas nomon nek adreson de la sendinto. Oni poste konstatas, ke ĉiuj nomoj de la sendintoj skribitaj sur la leteroj estas tiuj de membroj de la Unuiĝo por la jaro 2011, kaj sekve voĉdonrajtaj membroj.

Tial, je la fino de ĉiuj kontroloj, oni prikonsideras 246 leterojn.

Antaŭ ol malfermi la leterojn, la Balota Komisiono decidas, ke oni taksos nulaj la balotilojn en kiuj la voĉdono ne estas klare esprimata en unu aŭ en pluraj el la sekcioj de la balotilo mem, aŭ kiuj surhavas signifojn por ebla atribuo de la voĉo al persono aŭ ne konformaj al tio, kion diras la Statuto.

Poste, oni komencas malfermi la leterojn kaj kalkuli la esprimitajn voĉojn.

La rezulto estas la jena:

Validaj voĉoj: 242

Nulaj voĉoj: 4

**Ricevis voĉojn**

**por la ofico de Prezidanto:**

Daminelli Giovanni, voĉoj 196

Gleisner Karel, voĉoj 32

Murgaš Pavol, voĉoj 13

Sindetenis: 1

**por la elekto al la Estraro:**

Sarandrea Carlo, voĉoj 194

Šváček Miloslav, voĉoj 182

Svaldi Pier Luigi, voĉoj 132

Belošević Marija, voĉoj 129

Lepping Stefan, voĉoj 124

Petrík Pavol, voĉoj 106

Płatek Stanisław, voĉoj 100

Śmigielski Stanisław, voĉoj 61

Murgaš Pavol, voĉoj 54

**por la elekto al Konsilio de la Kontorevizoroj:**

Cescotti Covelli Norma, voĉoj 177

Fossati Tiziana, voĉoj 156

Tomczak Krzysztof, voĉoj 126

Dudová Drahomíra, voĉoj 90

Duda Josef, voĉoj 85

Tial estas elektitaj por la jarkvaro 2012-

2015, krom en kazo de rezigno aŭ forfalo aŭ forigo:
por la ofico de Prezidanto: Daminelli Giovanni; membroj de la Estraro: Sarandrea Carlo, Šváček Miloslav, Svaldi Pier Luigi, Belošević Marija, Lepping Stefan; membroj de la Konsilio de la Kontorevizoroj: Cescotti Covelli Norma; Fossati Tiziana; Tomczak Krzysztof.

La kunsido de la Balota Komisiono finiĝas je la horo 17.30

Post lego kaj aprobo, ĉi tiun protokolon subskribas:

S-rino Michela Lipari

S-ro Yasuo Sato

S-ro Giorgio Denti.

Romo, la 20an de februaro 2012.




Kadre de la Bibliaj Tagoj 2012, la 9an de marto 2012 ekde la horo 21,10 ĝis la horo 01.17, kunsidis en Trento (Italio) ĉe la Sanktejo *"Madonna delle Laste"* la nova Estraro, interalie por dividi inter si la statutajn funkciojn.

Kun la elektita **prezidanto** Giovanni Daminelli estis nomumitaj:

**religia konsilanto** frato Pier Luigi Svaldi

**unua vicprezidantino** Marija Belošević

**dua vicprezidanto** Miloslav Šváček

**ĝenerala sekretario/kasisto** Carlo Sarandrea

**sekretario por ekumenaj rilatoj** Stefan Lepping.

La kunsido alprenis gravajn decidojn pri la kongreso kaj asembleo de IKUE 2012, pri relanĉo de la asocia agado pere de plifortigo de internaj kaj eksteraj rilatoj, kun aparta pritrakto de la eldono de Espero Katolika kaj kontaktoj kun neesperantistaj religiaj movadoj kaj grupoj.

## Biografioj de la Estraranoj

**PREZIDANTO GIOVANNI DAMINELLI** naskiĝis en Bergamo (Italio) la 2an de aŭgusto 1943. Doktoro pri matematiko, esperantisto ekde 2000, en 2003 li akiris la superan diplomon de la Itala Instituto de Esperanto. Nuna prezidanto de la itala sekcio de IKUE - ekde 2003 - kaj ĝis la elekto, kontoreviziisto de IKUE. Li redaktas "Katolika Sento", kreis kaj prizorgas la oficialan paĝaron de la itala IKUE-sekcio (www.ueci.it). Nuntempe li gvidas E-kursojn en Milano ĉe la "Universitato de la tria aĝo" kaj en la urba E-klubo. Ekster IKUE, li estas membro de la paŝtista konsilio de sia paroĥo, sekretario de la Itala Instituto de Esperanto kaj konsiliano de la E-klubo de Milano.

**VICPREZIDANTINO MARIJA BELOŠEVIĆ** naskiĝis en Zagrebo (Kroatio) la 18an de julio 1965. Ŝi agas kiel katolika ĵurnalistino kunlaboranta kun kelkaj kroataj katolikaj naciaj komunikoj. Ŝi plenumas la taskon de la sekretario de la Kroata asocio de la katolikaj ĵurnalistoj. Pro sia profesia agado, ŝi i.a. komencis pristudi la historion de la organiza laikaro kaj eblecojn pri la engaĝigo de laikoj en Eklezio. La organizan E-movadon ŝi aktive partoprenas jam 31 jarojn, i.a. gvidante E-kursojn, organizante kaj kunorganizante eventojn, prelegante ĉe diversaj aranĝoj kaj E-societoj en pluraj landoj. Lastatempe ŝi komencis okupiĝi pri tradukado. En la internacia E-movado ŝi plenumis diversajn taskojn, i.a. TEJO-komitatano C, A-komitatano de UEA (por ILEI), B-komitatano de UEA, sekretario de ILEI. Momente ŝi en IKUE plenumas la funkcion de la vicprezidantino. Krom la 15an Ekumenan Esperanto-kongreson (2001), ŝi ankaŭ (kun)organizis la kongresojn de IKUE Rimini (2008), Parizo (2010) kaj Zagrebo (2011). Ŝi starigis valorajn eksterajn kontaktojn por IKUE kun la reprezentantoj de kelkaj aliaj grandaj katolikaj asocioj, ekz. la Fokolar-movado. Ankaŭ ŝi reprezentis "Espero Katolika"-n ĉe kelkaj gravaj katolikaj aranĝoj kaj la E-elsendon de Radio Vatikana ĉe la kunvenoj de radio-aŭskultantoj okaze de la Universalaj kongresoj. Krome ŝi faris IKUE'n videbla dum pluraj UK-oj (faka foiro, faka forumo, ks.).

**VICPREZIDANTO MILOSLAV ŠVÁČEK** naskiĝis la 2an de februaro 1941 en Střítež nad Ludinou (Ĉeĥa Respubliko). Ĝis nuna Prezidanto de IKUE kaj gvidanta aktivulo de la Katolika Sekcio de Ĉeĥa E-asocio. Redaktoro de "Dio Benu", organizanto de Katolikaj Esperanto-Tendaroj en Sebranice apud Litomyšl kaj ankaŭ organizinto de kelkaj IKUE-Kongresoj okazintaj en Ĉeĥa Respubliko. Dum la komunisma epoko en la tiama Ĉeĥoslovakio li estis persekutata pro la Katolikaj Esperanto-Tendaroj en Herbortice, kiujn li organizadis. En 2008 li ricevis Medalon Komenio de la magistrato de la urbo Přerov pro la propagando de la urbo per Esperanto. En 2009 la Ĉeĥa episkopara konferenco donis al li memor-medalon.

**SEKRETARIO KASISTO CARLO SARANDREA** naskiĝis la 3an de septembro 1962 en Romo (Italio). Li lernis Esperanton kiel 16-jarulo kaj jam mallonge poste komencis abundan aktivadon en la itala Esperanto-movado kaj en IKUE: estrarano de la roma katolika Esperanto-grupo, prezidanto de la itala IKUE-sekcio, kunredaktoro

de la itala Esperanto-revuo, konsiliano de Itala Esperantista Federacio, parolisto kaj poste redaktoro de la Esperanto-elsendoj ĉe Radio Vatikana, redaktoro de Espero Katolika (de ĉirkaŭ 1982 ĝis hodiaŭ), kunorganizanto de IKUE-Kongresoj, sekretario kaj retestro de IKUE.

**ESTRARANO POR EKUMENAJ RILATOJ STEFAN LEPPING** naskiĝis en Stadtlohn (Germanio) la 28an de marto 1971, kiel kvara infano de katolika familio. En 1990 post abiturienta ekzameno li kontaktis pentekostanan komunumon kaj decidis sekvi Jesuon. En 1993, returniĝo, ĉi-foje konscia, al katolika kredo. En 1995-1997 kunvivado en Komunumo de Beatecoj, katolika karismana juna komunumo. En 1998-2004, studado de eklezia muziko kaj iomete da teologio. De 2004 ĝis hodiaŭ: laborado kiel orgenisto, ĥorestro kaj piano-instruisto. Ekde 2005 li loĝas en Werl, kunvivante en loza (larĝa) komuneco de kristanoj.

**SPIRITA KONSILANTO Frato PIERLUIGI SVALDI** naskiĝis la 2an de marto 1950 en Bedollo Trento (Italio). Li estas franciskana frato, kiu iĝis pastro en 1980. Li estis komence asistanto en la porjunulara seminario; poste li kunlaboris dum 9 jaroj en la mastrumado de kuracdomo por alkoholistoj, droguloj kaj psiĥaj malfortuloj. Li estis administracianto de pluraj franciskanaj domoj kaj nun li estas direktoro de la monaĥejo de Trento. Li estas esperantisto ekde 2007. Vicprezidanto de la itala IKUE-sekcio ekde 2009, li prizorgas la liturgian programon de la sekciaj kongresoj, dum kiuj li ankaŭ prelegas. Li prizorgas religian rubrikon en "Katolika Sento".

## Invito al la IKUE-anoj

Estas aktualigata/kompilata IKUE-retadresaro. Ĝia celo estas strikte ligita al la interna informado. Do, la adresojn oni tute ne publikigos ie kun risko de alveno de spamaĵoj.
Vian aktualan retadreson bv. komuniki al la vicprezidantino de IKUE Marija Belošević: marija@catholic.org. Dankon.


**RADIO VATIKANA - Elsendoj en Esperanto**

*La elsendoj okazas trifoje semajne, en la sama* **horo 21.20 MET (20.20 UTC)**

**DIMANĈE - daŭro 8' -** frekvencoj: *MO* 1530 kHz - *KO* 3975, 6075, 7250, 9645, 13765 kHz. *Satelite:* EEUTELSAT 1- HOT BIRD 8 -13° E-Bouquet RAI (Europe) 11804 MHz - LVCP - SID 3320 CH - 1/2 — INTELSAT AOR - IS 907@ 332,5° E (Atlantic Region) 4161.705 MHz - GLOBAL B - Polarization Rx LHCP CH - 1

**MERKREDE KAJ ĴAŬDE - daŭro 9' -** frekvencoj: *MO 1260, 1611 kHz - KO* 5980, 11885 kHz. *Satelite*: EUTELSAT 2-HOT BIRD 8 - 13° E Bouquet GLOBECAST (Europe) 12380 MHz - LVCP - SID 3007 CH - 2 TelePace — INTELSAT IOR - IS 904 @ 60° E (Indian Region) 4103.350 MHz - GLOBAL B - Polarization Rx LHCP CH-1

**Oni povas aŭskulti ankaŭ per la Interreto:**
http://www.oecumene.radiovaticana.org/esp/on_demand.asp
*Granda arkivo:* http://www.radio-vatikana-esperanto.org

*Petu la senpagan sesmonatan program-bultenon.*
*Skribu al:* **RADIO VATIKANA - ESPERANTO**
**SCV-00120 CITTÀ DEL VATICANO**
**Ret-poŝto: <esperanto@vatiradio.va>**

HEROLDO DE ESPERANTO, trisemajna informa gazeto pri la E-mondo, estas de 1920 je la servo de nia lingvo kaj ĝia parolkomunumo. 17 numeroj jare, ilustritaj raportoj el la tuta mondo, diversaj rubrikoj, kalendaro, kongresaj numeroj ktp. Eldonas, posedas kaj administras: LF-koop. Mendu provekzempleron ĉe: Heroldo de Esperanto, CP 928, CH-2301 La Chaux-de-Fonds, Svislando.



*Unu el la ĉiutagaj Mesoj en la interna kapelo de la kongresejo por la katolikaj gefratoj.*



*Trento: ĉe la Fontano de Neptuno, en la centra placo de la Katedralo.*

# BIBLIAJ TAGOJ 2012 en TRENTO (Italio)


*(raporto en la internaj paĝoj)*



*En Arco oni staris sub Himalaja cedro, pli malnova ol Esperanto, ĉar tiu arbo "naskiĝis" en 1872.*



*Norma Cescotti Covelli, la ĉefa organizantino de la Bibliaj Tagoj, kiun helpis frato Pier Luigi Svaldi kaj aliaj samideanoj de Trento.*



*La impona sonorilo de la falintoj (Maria Dolens), kiu staras sur monteto Miravalle en Rovereto, estas la 4a plej granda el sia speco en la mondo: ĝi pezas 22,639 tunojn, altas 3,36 metrojn kaj ĝia diametro estas 3,21 metroj. Oni realigis ĝin en 1924 per la kunfando de la bronzo de pafilegoj el 19 landoj interbatalantaj dum la unua mondmilito. Ĝi fariĝis simbolo de monda paco kiu unuigas, dank' al la 85 flagoj ĉirkaŭ ĝi, ankaŭ naciojn en malpaco inter si. Ĉiuvespere aŭdiĝas 100 ĝiaj batadoj, rememore pri la falintaj soldatoj de ĉiuj militoj kaj armeoj, sendistinge. La sono estas B bemola.*